# Raúl Castro alvenis al Venezuelo okaze de pintkunsido ALBA-TCP



Karakaso, 5 mar (RHK) La kuba prezidento Raúl Castro alvenis ?i-lunde al Venezuelo por partopeni en la XV-a pintkunsido de la bolivara alianco por la popoloj de nia ameriko (ALBA-TCP).

La ministro por defendo, Vladimir Padrino Lópe, akceptis la Kuban ?tatestron en la flughaveno internacia de Maiquetía “Simón Bolívar, en La Guaira, ?tato de Vargas.

Siaflanke, la prezidento de Bolivio, Evo Morales, kaj ties homologo de Nikaragvo, Daniel Ortega, alvenis anta?e por partopreni la pintkunsidon.

Tiu ?i bolivara alianco estis kreita la 14-an de decembro de 2004 de la komdantoj Hugo Chávez, de Venezuelo, Kj Fidel Castro, kiel respondo al la areo de libera komerco por la Amerikoj (ALCA), impulsita de Usono por establi liberan merkaton dama?an por la elmer?antaj ekonomioj de la sudamerikaj landoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/156699-raul-castro-alvenis-al-venezuelo-okaze-de-pintkunsido-alba-tcp

**Radio Habana Cuba**